

Gustav Doré: Mateo 5 Prediko de sur la monto



Vidante tiun amason, li suriris la monton; kiam li sidis, venis al li liaj lernantoj. Li malfermis la buŝon kaj instruis ilin

KELI

Kristana Esperantista Ligo Internacia
fondita en 1911, neneŭtrala kunlaboranta kun UEA

Celo: *Krei efikan kontakton inter kristanoj el diversaj landoj kaj per Esperanto diskonigi la Evangelion pri Jesuo Kristo.*

Prezidanto: Philippe COUSSON

✉ 26 rue de Pré-Ventenet,
FR 86340 Nouaillé-Maupertuis, Francio;
☎ +33 (0) 549468021; ✉ keli@chez.com

Sekretario: Pavel POLNICKÝ;

✉ Na Vinici 110/10,
CZ 290 01 Poděbrady II, Ĉeĥio
☎ +420 311 241 406;
✉ polnickypavel@seznam.cz

Kasisto: Ágnes RÁCZKEVY-EÖTVÖS

✉ Klauzál utca 32,
HU 1072 Budapest, Hungario
☎ +36 302 000 306;
✉ agnes@raczkevy-eotvos.com

Kotizoj: Rekta membro kun gazeto, minimume €20,- • Membro-subtenanto €30,- • Nura abono: pagante rekte al KELI €16,- • pagante al Libroservo €18,- • Sendoj de okcidentaj monbiletoj per registrita letero al la kasisto de KELI. •

Se estas en via lando UEA-poŝtĝirkonto (informiĝu ĉe UEA) bonvolu preferi pagi al UEA por konto **kelk-p** de KELI • Franca bankkonto de 'KELI Ligue Chrétienne Espérantiste Internationale':
CIC-banko, BIC: CMCIFRPP;
IBAN: FR76 1009 6182 4800 0368 7480 104

Vizitu ankaŭ la ttt-paĝon www.chez.com/keli/

DIA REGNO

Oficiala organo de KELI, fondita en 1908
dumonata revuo - ISSN 0167-9554

Redaktoro: Bengt Olof ÅRADSSON

✉ Nygatan 10 A; 281 48 Hässleholm; Svedio;
☎ +46 70 2004574; ✉ dr_boarad@yahoo.se

Kontrollegis: Éva FARKAS-TATÁR, Pavel POLNICKÝ

Abonprezo sen membreco en KELI: €16,- aŭ egalvalora. Abonoj kaj anonckostoj pagotaj al la kasisto de KELI (vidu supre).

Pri la enhavo de la artikoloj respondecas nur la aŭtoroj. Represo kaj traduko permesataj, kondiĉe ke oni citas la fonton. Specimenon kun represo aŭ traduko oni sendu al la redaktoro.

Ekspedado: Pavel POLNICKÝ

Vidu la adreson de la sekretario

Presado: Tiskárna ASTROprint s.r.o., Poděbrady, Ĉeĥio
✉ info@astroprint.cz

Eldonmonatoj: meze de feb, apr, jun, sep, okt, dec.

ENHAVO

Akvo: de la universo ĝis mi mem	99
Malfrua ĉagreno	107
Morto kaj triumfo en Norda Koreo	108
Enkonduko historia – iom pri alilingva verkado	111
Recenzo: La bona mesaĝo de Jesuo – la kvar evangeliĵoj	114
Raporto de la jarkunveno en Svitavy 08.08.2013	116
Informetoj	118
Nekrologo: Cornelis Leen Dekker	119
Tag' del' Sinjor'	120

REDAKTORAJ VORTOJ

Preparante tiun ĉi numeron mi eksciis pri la terura katastrofo kiu trafis Filipinojn. Mi ne havas imagkapablon kompreni nek la situacion nek la personajn aŭ la sociajn sekvojn kaj kostojn. Ĉiu suferanto bezonas niajn preĝojn.

Kutime ni en nia 5a numero prezentas la sekvontjaran kongreson kaj publikigas la aliĝilon. Kvankam ni malfruigis la preparadon de la nuna numero de Dia Regno, ni ankoraŭ ne havas sufiĉe da informo por ke ni povu informi vin. Do, en la sekvonta numero, kiun vi ricevos antaŭ Kristnasko laŭ la plano.

En la nuna numero vi legos i.a. pri akvo, temo de la somera kongreso. Vi ankaŭ legos pri martiroj en Norda Koreo kaj pri greklingvaj verkoj kaj pri malfrua ĉagreno, k.t.p. Mi deziras agrablan legadon.

Akvo: de la universo ĝis mi mem

Prelego dum la KELI-kongreso 2013 en Svitavy

Philippe COUSSON, FR

Enloĝebla zono ene de sunsistemo

Vi ĉiuj certe aŭdis pri la graveco de akvo por la vivo, almenaŭ por la vivo, tia kia ni konas ĝin aŭ supozas.

Astronomiaj esplorantoj, nun kiam ili havas instrumentojn kaj metodojn pli efikajn kapablas determini ĉu ĉirkaŭ relative proksimaj steloj troviĝas planedoj. Eĉ pli, ili povas determini masojn, temperaturojn kaj kemiajn komponantojn.

Ili determinis tion, kion ili nomas “enloĝebla zono” en sunsistemo. Tio estas la regiono de la spaco ĉirkaŭ la stelo kie oni supozas ke akvo troviĝas en likva stato. Pli proksime la tuta akvo vaporiĝas, pli malproksime la akvo glaciĝas. Do se troviĝas en tiu zono planedo kun roka surfaco (t.e. certe ne planedo el gaso, kiel Jupitero aŭ Saturno), tiam ekzistas ebleco ke vivo floru sur tiu planedo. Kompreneble, oni ne konas la stadion de evoluo de la eventuala vivo sur ĝia grundo. Kaj ankaŭ, troviĝi en tiu zono ne sufiĉas. Ekzistas ankaŭ difinita enloĝebla zono galaksia, ne tro proksime kaj ne tro for de la centro de la galaksio. Sed tio estas alia afero.

Do, gravas likva akvo.

Morto kaj vivo

Ni ĉiuj konstatis ke akvo, se necesa por la vivo kapablas ankaŭ forpreni la vivon.



Philippe Cousson. Fotis Václav Pospíšil

Por vivanta estaĵo, planto aŭ besto, akvo estas necesa. Same plantoj kaj bestoj povas soifi. Estas grave ke la akvo estu alirebla, havebla. Plantoj kaj bestoj povas morti pro soifo.

Efektive, akvo estas necesa por la vivo, nepre necesa. Kaj tiu soifo ne estas simple deziro pri vino, biero aŭ soda trinkaĵo. Ĝi estas vere vivneceso.

Por kreski, plantoj, ĉu kultivitaj, ĉu sovaĝaj, bezonas akvon, kaj tiun akvon ili ricevas plej ofte per la pluvo. Kie ne estas pluvo, la plantoj nature aŭ la kultivistoj arte devas trovi solvojn por elturniĝi el tiu ĉi manko.

La utilo de akvo estas ankoraŭ pli vasta. Pro siaj kemiaj karakterizoj, la akvo kapablas solvi multajn elementojn, tial ankaŭ ĝi estas grava. Ĝi kapablas

(Tiu ĉi teksto estis verkita por prezento ilustrita de serio de bildoj)

transporti multajn elementojn por nutri kaj ankaŭ purigi la vivantajn estaĵojn. Ĝi ĉefe helpas en nutrado kaj ankaŭ en purigado.

Tiun purigado-kapablon ankaŭ la homo uzas.

Alia natura kaj homa uzo de akvo estas ĝia kapablo estingi fajron.

Same kiel ĝi permesas iel haltigi la grandan minacon, kiu estas la fajregoj, ĝi tamen estas en si mem minaco.

En diversaj partoj de Eŭropo kaj de la mondo, antaŭnelonge, oni travivis inundegojn. Ni ĉiuj vidis la detru-kapablon de la akvo. Kontraŭ la alveno de amasego da akvo, oni preskaŭ povas fari nenion, krom atendi ke ĝi foriru kaj konstati la detruojn.

La Biblio kaj diversaj tradiciaj kaj mitologiaj fontoj raportas pri iu diluvo, pri iu grandega inundo, kiu kovris se ne la tutan teron, almenaŭ la tutan regionon, landon.

La detruoj estas tiel teruraj kiel pro fajrego.

Kaj ni, eŭropanoj malkovris ankaŭ kion en alia kontinento oni nomas cunamo. Antaŭ kelkaj jaroj niaj televidaj ekranoj estis plenaj de bildoj pri la Sumatra cunamo. Antaŭ nelonge venis bildoj pri la japana cunamo, kiu ankaŭ trafis atomcentralon jam parte detruitan de tertremo.

Same kiel ĝi portas kaj permesas vivon, akvo kapablas detru kaj alporti morton.

Sed, tamen, la akvo ankaŭ kapablas ripari, revivigi, regeneri. Oni trovis tiun ĉi besteton, kiu kiam ĝi vivas en seka medio modifas sian morfologion kaj

ŝajne ĉesas vivi. Sed, kiam la medio denove, eĉ post jarcentoj, fariĝas mal-seka, la besteto komencas absorbi akvon kaj iom post iom reviviĝas, kaj fine komplete vivas. Revo de pluraj homoj.

Tiu ĉi ripara kaj saniga funkcio estis observita de longe en tradiciaj kulturoj kaj disvolvita jam en la antikvaj tempoj. T.e. la termalaj akvoj, banejoj. Ni havis la okazon kongresi, almenaŭ unu fojon en urbo kun tiaj akvoj. Tio estas kutimo en pluraj landoj. La akvo kunportas diversajn elementojn kiuj kapablas kuraci.

Tamen, kvankam ekzistas legendoj pri lokoj kie oni trovas fonton de la perfekta akvo, kiu vivigas, kiu rejunigas, la t.n. fonto de juneco. Tiu mito estas forta kaj tre ofta en la diversaj kontinentoj. Homoj esploris por trovi ĝin, kaj mortis pro tio.

La eterneco restas revo por multaj homoj, kaj tiaj mitoj ricevas daŭre grandan pezon.

Akvo kaj medio

Dum jarcentoj, la homoj, inter ili la monaĥoj, laboris por sekigi la diversajn marĉojn, detruante tiel multajn akvajn mediojn.

La nuna sinteno de la gvidantoj de la registaroj estas protekti tiujn ĉi akvajn mediojn, ĉar oni konstatis ke ili entenas variajn estaĵojn, plantojn kaj bestojn, kiuj ne ekzistas en aliaj medioj.

La protektado kaj la konservado de tiuj zonoj fariĝas nun grava tasko de la homoj. Ni ankaŭ havis diversajn okazojn viziti tiajn lokojn. Mi ne memoras la nomojn de la diversaj plantoj kaj bestoj,



Vizito al marĉo dum la kongreso en Beregdaroc 2010. Fotis Ágnes Ráczkevy-Eötvös

sed mi konas iun ĉeĥon kiu certe konas multajn tiajn nomojn.

La protektado de la biodiverseco fariĝas ankaŭ unu grava batalo por multaj. Ankaŭ rilate al la akvaj medioj.

Estas do medioj kun multe da akvo, sed same ekzistas medioj sen akvo, aŭ preskaŭ sen akvo, t.e. la dezertoj. Eĉ en tiuj medioj vivas plantoj kaj bestoj. Kie ili trovas akvon foje estas mistero, foje oni komprenas: ekzemple kelkaj prenas la akvon entenatan en la aero kiu al ni ŝajnas tute seka, aŭ profunde en la grundo.

Tamen, la aktuala tendenco estas la pligrandiĝo de la dezertoj, ili kreskas. Kaj fariĝas problemo pri akvo. Tiu sekeco variis en la daŭro de la jarcentoj aŭ jarmiloj, sed nun ĝi estas en plivastiĝa periodo, ekzemple en la regiono sude de Saharo kiun oni nomas Sahelo.

Kvankam restas kelkaj kiuj neas la fenomenon, multaj sciencistoj konstatas la modifon de la klimato. Kaj kompreneble, tiu klimatsanĝiĝo ankaŭ tuŝas la akvon: sekiĝo de regionoj, fandiĝo de glaciejoj, supreniĝo de la marnivelo. Kaj

tio ne estas bagatelaĵo, eĉ se en la daŭro de la geologiaj epokoj tio ne estas nova. Fakte tio estas por la homaro minaco, aro da riskoj. Vi certe ankaŭ aŭdis pri diversaj insuloj, en la Pacifika Oceano aŭ en la Hinda Oceano, kiuj vidas kun malespero la akvon superi la grundon. Homoj vivas nun kun la piedoj ene de la mara akvo. Tro grandaj ondoj kaj detruoj pliiĝas.

La registaroj plendas al UN. Ili postulas jam de jaroj ke oni, t.e. la riĉaj landoj kaj la rapide evoluantaj landoj, reduktu la produkton de tio kio kontribuas al la varmigo de la planedo.

Por frapi la imagon, ekzemple, la registaro de la Maldiva insularo okazigis kunvenon subakvan kun “plonĝ”-ekipitaj ministroj.

Inter la diversaj minacoj kiuj rilatas al akvo estas do subakvigo de loĝataj regionoj. Pri la sorto de tiuj popoloj respondecas ankaŭ la aliaj homoj, la aliaj registaroj.

Sed la akvo mem estas minacata, minacata pri la malpureco kiun fabrikas la homa aktivado. Oni tiam parolas pri polucio. Ĝi povas veni el industrio per diversaj kemiaĵoj aŭ nukleaĵoj ellasitaj en la riveroj, en la maroj. Ĝi povas veni el agrikulturo, el bestbredado aŭ el la kultivaj sterkaĵoj. Inter ili estas la nitratoj kiuj, estante en la maro, multobligas la verdajn algojn. Ĝi ankaŭ venas el la homa vivo mem, kiam ne ekzistas la higienaj ekipaĵoj. Sufiĉas vidi la bildojn de la kabanaj kvartaloj en diversaj urboj, kie la infanoj ludas en malpura akvo. Ne surprize ke malsanoj svarmas en tiaj kondiĉoj.

Granda batalo estas lukti por ke pli kaj pli da homoj povu profiti el higienaj instalaĵoj kaj vivi sane. Sed ankaŭ por tio, ili bezonas aliron al akvo pura.

Aliro al la akvo

Aliro al pura akvo estas tute ne egala al la homoj. En Eŭropo, ni ĉiuj havas puran akvon el la krano, plejofte. En aliaj landoj, ĝenerale la virinoj, devas paŝi kelkajn kilometrojn por ĉerpi malpuran akvon. Sed ne temas nur pri la trinkakvo, temas ankaŭ pri la akvo por kultivi. De la antikvaj periodoj, homoj inventis sistemojn por kapti akvon kaj konduki ĝin, tien kie ĝi estas bezonata. Homoj devas bori putojn, konstrui cisternojn por havi uzeblan akvon.

Kaj en la sama momento, en niaj riĉaj regionoj, ni misuzas akvon, malŝparas ĝin. Oni nun pli kaj pli trovas la tiel nomatajn sekajn necesejojn, kie la akvo estas anstataŭata de lignaĵeroj. Multaj industriaj produktaĵoj konsumas tiom multe da akvo ke oni eĉ ne povas imagi. Mi tamen konscias ke akvo estas malfacile transportebla de regiono kun akvo al senakva regiono. Tiu malegala disdono de akvo ĉirkaŭ la planedo estas defio al la homa inteligenteco.

Ekzistas grandaj rimedoj por transporti akvon, tio estas la riveroj. Sed, kiam rivero trapasas landlimon, tio tuj kaŭzas konfliktojn. Mi simple mencios plurajn kazojn. En Israelujo/Palestino, la divido de akvo estas tute malegala. La grandaj akvaj tavoloj troviĝas sub Cisjordanio, kaj la fluanta akvo venas de la nordo. La Israelianoj konstruis kanalojn kiuj kaptas la plejparton de la akvo al siaj

urboj. En tiu tempo, la nivelo de la Morta Maro pli kaj pli malaltiĝas ĉar ne ricevas sufiĉe da akvo tra la rivero Jordan. La problemo pri akvo estas unu el la plej akutaj diskuttemoj inter la du registaroj.

La samo okazis antaŭ jardekoj kun la Arala Maro, sed tiam estis ĉar oni pumpis multege da akvo en la du riveroj kiuj fluas el la montoj al la interna maro por kultivi industrie kotonon.

Alia kazo de konflikto troviĝas sur la rivero, pri kiu vi certe aŭdis almenaŭ en la Biblio, Eŭfrato. Ĝi naskiĝas en la montoj kiuj nun estas en orienta Turkujo, trapasas Sirion kaj Irakon kaj finas apud Kuvajto en la Araba-persan Golfon. La turka plano por orienta Anatolio postulis multe da akvo. La Turkoj do konstruis baraĝejojn. Kelkaj eĉ subakvigis arkeologiajn trezorojn. En Sirio ankaŭ oni konstruis baraĝojn. Kaj kompreneble la Irakanoj plendas.

Mi legis ie ke la venonta granda milito okazos ne pro energio, petrolo, sed pro akvo.

Rilate al la granda rivero Nilo, ekzistas traktato inter la landoj de ĝia baseno, sed la disputoj restas. Etiopujo baras. Sudano baras.

Mi legis ie ke la venonta granda milito okazos ne pro energio, petrolo, sed pro akvo. Ni tamen devas esperi ke la diversaj internaciaj institucioj kaj juro sukcesos anstataŭigi konflikton per kunlaboro.

La aliro de la popoloj al akvo pli kaj pli disvolviĝas. Tamen, mi devas lasi al

vi bemolon. Tio okazas dank' al grandaj internaciaj kompanioj, inter ili kelkaj francaj, kiuj jes investas, sed ankaŭ profitas el tiu merkato. Teknikoj ekzistas kaj disvolviĝas. Sed ĉu same la homaj rajtoj disvolviĝas rilate la aliron al akvo? Eble ne.

Krome, en kelkaj lokoj, kie ekzistis sufiĉe bona reto de disdono de akvo, venis milito, interna milito aŭ ekstera milito, kiu komplete detruis la tuton. Oni do devas rekonstrui, sed en malstabila situacio, kun korupcio kaj terorismo. Malfacile.

Dio mastras la akvon

Post travido de la akvo en la naturo kaj de la nur tre parta mastrumado de la akvo fare de la homoj, mi legos al vi la psalmon 104, kiu montras ke Dio mastras la akvon, kaj la ceteron de la naturo. (Vidu parton de la psalmo 104 sube)

Psalmo 104

1Benu, ho mia animo, la Eternulon. Ho Eternulo, mia Dio, Vi estas tre granda, De majesto kaj beleco Vi estas vestita; **2**Vi, kiu estas ĉirkaŭkovrita de lumo kiel de vesto, Kiu sternas la ĉielon kiel tapiŝon; **3**Kiu aranĝas sur la akvo Sijajn ĉambrojn, Kiu faras la nubojn Lia veturilo; Kiu iras sur la flugiloj de la vento; **4**Kiu faras la ventojn Liaj senditoj, Flamantan fajron Liaj servantoj; **5**Kiu fondis la teron sur ĝiaj fundamentoj, Ke ĝi neniam ŝanceliĝos. **6**La abismon Vi kovris kiel per vesto, Sur la montoj staras akvo; **7**De Via minaco ĝi kuras, De la voĉo de Via tondro ĝi forrapidas. **8**Ĝi leviĝas sur montojn, malleviĝas sur valojn, Al tiu loko, kiun Vi destinis por ĝi. **9**Vi faris limon, kiun ĝi ne superpaŝos, Por ke ĝi ne revenu por kovri la teron. **10**Vi sendas fontojn al la riveroj, Kiuj iras inter montoj; **11**Ili trinkigas ĉiujn kampajn bestojn; Sovaĝaj azenoj kvietigas sian soifon. **12**Apud ili loĝas la birdoj ĉielaj, El inter la branĉoj ili sonigas sian voĉon. **13**Vi trinkigas la montojn el Viaj ĉambroj; Per la produktoj de Viaj faroj satiĝas la tero. **14**Vi kreskigas herbon por la bruto, Kaj verdaĵon, kiu servas al la homo, Por elirigi panon el la tero. **15**Kaj la vino gajigas la koron de la homo, La vizaĝo brilas de la oleo, Kaj la pano fortikigas la koron de la homo....

33Mi kantados al la Eternulo, dum mi vivos; Mi muzikados al mia Dio, dum mi estos. **34**Agabla estu al Li mia meditado; Mi ĝojos pri la Eternulo. **35**Malaperu pekuloj de sur la tero, Kaj malvirtuloj ne plu ekzistu. Benu, ho mia animo, la Eternulon. Haleluja

Super la akvoj

La unua mencio de akvo en la Biblio troviĝas en la dua versiklo: la spirito de Dio ŝvebis super la akvo. Kompreneble, ĉi tie ne temas pri iu primitiva oceano, ĉar temas pri tempo antaŭ la kreado, la paroloj de Dio kiuj estigis nian mondon, nian universon. Tamen, temas pri la sento de la eblecoj, kiujn enhavas en si mem la akvo, kvazaŭ ĉio venus el ĝi. Kaj ni vidis ke sen akvo, oni ne povas imagi vivon.

Formoj de akvo en la Biblio

En sia artikolo en la dua numero de Evangeliaj Kajeroj, Antoni Tabacki menciis la diversajn formojn kiujn prenas la akvo en la Biblio. Post konstato ke la Biblio jam konas aŭ divenas la akvocirkulon: fonto, rivero, maro, nuboj, pluvo, grundo, fonto... li citas kelkajn ekzemplojn.

Pri la nuboj, li citas el Ijob 38,34-37:

“Ĉu vi povas levi al la nubo vian voĉon, ke abundo da akvo vin kovru? Ĉu vi povas sendi fulmojn, ke ili iru kaj diru al vi: Jen ni estas? [...] Kaj kiu elverŝas la felsakojn de la ĉielo?”

Li mencias la pluvon, la roson, eĉ la hajlon en Psalmo 78:47-48: “Per hajlo, Li batis iliajn vinberojn, kaj iliajn sikomorojn per frosto, Li elmetis al hajlo iliajn brutojn, kaj ilian paŝtararon al fulmo.

Ankaŭ estas meniciitaj la neĝo kaj la prujno. Neĝon vi konas. Prujno eble ne. Ĝi estas la tavolo glacia kiu formiĝas sur la objektoj, plantoj kiam frostas en malseka atmosfero. En Psalmo 147:16: “Li donas neĝon kiel lanon, Li ŝatas prujnon kiel cindron.” Pri la neĝo vi certe aŭdis la esprimon, kiu venas el la Biblio: “pli blanka ol neĝo” ekz. en Psalmo 51.

Putoj kaj cisternoj

En la lando Kanaan, la akvo ne estis tro ofta en la bibliaj tempoj same kiel nuntempe. Tial estas tre grave havi putojn kaj cisternojn. Ek de la unua libro de la Biblio, Genezo, oni aŭdas pri putoj en la rakontoj de la abrahama ciklo, ankaŭ en la rakontoj pri Jakob, pri Jozefo. Ekzemple, la malplena cisterno kie la fratoj tenis sian fraton mallibera ĝis ili vendis lin.

Alia rakonto pri malplena cisterno estas tiu de Jeremia, kiu estis tie katenita dum sieĝo de la urbo.

Mi jam aludis al putoj dum la patriarka periodo. Oni retrovas la puton de Jozefo en la rakonto evangelia pri la renkonto inter Jesuo kaj la Samarianino, rakonto kiu parolas pri akvo, soifo kaj vivakvo.

La rakonto troviĝas en Johano 4.

Putoj kaj cisternoj apartenis al tiu civilizo. Tio montras la gravecon de la aliro al la akvo.

Riveroj

Riveroj aperas en la Biblio kiel limoj kiujn oni devas trapasi. Sufiĉas rememori pri la rivero Jabok por Jakobo, pri la rivero Jordan por Josuo aŭ por Elia.

Torentoj povas fariĝi en tiaj regionoj tiel tumultaj ke ili agas kvazaŭ enlanda cunamo laŭ la aludo en Ijob 12:15: “kiam Li (Dio) fluigas ĝin (la akvon), ĝi renversas la teron”.

Mi jam aludis al la edena rivero Eŭfrato. Estis tri aliaj en la rakonto. Paradiza ĝardeno ne povas esti imagata sen akvo.

Parolante pri komenco de la Biblio, oni ankaŭ povas paroli pri la fino. En ambaŭ troviĝas rivero kiu alportas la vivon. Johano en sia Apokalipso preskribas riveron kiu venas el la sidejo de Dio, kiel ankaŭ Jeĥezkel vidis riveron kiu elfluis el la Templo.

En la lastaj tempoj, la riveroj ne plu disigas la homojn, sed ili kunigas ilin ĉirkaŭ la Dio de la vivo, “kaj ne plu ekzistos malbeno”.

Maro

La Hebreoj ne estis marista popolo. La maro restas malbenita loko. Ni havas en la Biblio du famajn rakontojn pri ŝtormo en maro kaj kun minaco al ŝipo. Temas pri la fuĝo de Jonas, kaj la vojaĝo al Romo de Paŭlo. La rakontoj similas sed estas kelkaj diferencoj ekzemple pri la sorto de la ŝipo. En la evangelioj estas


ankaŭ rakonto pri ŝtormo, kiun kvietigis Jesuo, sed tio okazis en granda lago, ne vera maro. Akvo en tia kvanto ne estas la elemento de la Hebreoj.

Moseo

La tuta vivo de Moseo estas ligita al akvo. Kiam li naskiĝis la duan fojon, li estis savita el la rivero, el la akvo kaj akceptita de la princino de Egiptujo.

Post lia reveno al Egiptujo, kiam li alfrontis la Faraonon, li plurfoje intervenis ĉe la rivero, kaj kaŭzis plurajn plagojn al la rivero, ekzemple, la akvoj ŝanĝiĝis al sango.

Kiam, kun la popolo, li fuĝis la landon, ili estis baritaj de marbranĉo. Denove akvo-limo. Kaj jen tiun limon li trapasas, kiel Jakobo, kiel poste Josuo kaj Elija Jordanon. La reveno de la akvoj post la paso de la popolo savis ĝin. Trapaso de akvo por Josuo estis la



Laŭ Doré: Moseo frapas la rokon

komenca ŝtupo por konkero de la promesita lando. Por Elija, tio estis la unua paŝo al alispeca vojaĝo al Dio.

Dum la irado en la dezerto, Moseo havis kelkajn problemojn kun akvo, kio en dezerto ne estas surpriza. En Eliro 15:23 en Mara la akvo estis amara. Dio indikis al li kiamaniere dolĉigi la akvon. En alia loko, du ĉapitrojn poste, la popolo ne trovis akvon, kaj la Eternulo diris al Moseo, ke li frapu la rokon, kaj el ĝi fluis akvo. Vi memoras, ke li ne devis refrapi la rokon sed simple paroli al ĝi, sed li frapis dufoje. Venis akvo, sed ankaŭ tio sigelis lian ne-eniron en la landon laŭ la fino de Readmono.

Akvo kaj sango... kaj vino

En la unua epistolo de Johano venas ankaŭ la apudmeto de akvo kaj sango. Ili ambaŭ, kaj kun la Spirito, atestas pri Jesuo. Akvo kaj sango ne estas ĉiam malbona simbolo, sed ankaŭ simbolo de liberigo. Akvo kaj sango ankaŭ estis kune kiam Elija venkis la profetojn de Baal, kiam la sango de la ofero miksiĝis kun la akvo de la fosaĵo de la altaro. El la flanko de la krucumita Jesuo fluis ankaŭ sango kaj akvo laŭ la atesto de Johano en 19:34.

Kiam oni serĉas la rilaton inter akvo kaj vino, tuj venas en la kapon la epizodo de la nuptofesto en Kana, kie Jesuo ŝanĝis akvon al vino.

Se vi bone memoras, la kuvo estis tie por la akvo de purigado. Tio indikas ankaŭ la gravecon por la Judoj, kaj ankaŭ aliaj, de la ritoj kun akvo, purigado, ban-ritoj, renovigo.

Purigaj ritoj

Ankaŭ en aliaj religioj estas purigaj ritoj. En la Biblio estas ankaŭ tiaj, ĉu simbolaj, ĉu efektivaj. Oni trovis en Qumran kuvojn por tiu celo. La pastroj devis sin purigi antaŭ sia servo. La bapto kristana havas judan originon kiel simbola purigado. Vi ĉiuj aŭdis certe multfoje la klarigon de la kristana bapto: morto kaj revivigo. Tie la signifo ne plu estas la purigo, ĉar Jesuo faris tion, sed simbola eniro en novan vivon, eniro en novan aliancon.

Viva akvo

Jesuo diris al la Samarianino ke li donas la vivan akvon, ke post tiu trinkado ne plu estos soifoj. La nova vivo postulas alian akvon ol tiu de la ĉi-monda akvo. Komprenu min, ni ne ĉesu trinki akvon. Sed same kiel ni daŭre manĝos panon, eĉ se ni vivas ankaŭ el la parolo de Dio,



Narciso de Michelangelo Caravaggio

ni vivas per la vivo donita de Jesuo.

Oni eĉ diras pli. Tiu kiu ricevis akvon el tiu senfina fonto, mem fariĝos fonto, fonto de viva akvo. Tiu viva akvo de Jesuo, sorbita de la kredanto, elŝprucos el li/ŝi. Tio estas tasko kaj promeso. Ĉar ni plu soifas spirite, ni verŝas tiun vivan akvon ĉirkaŭ ni, ne intence sed pro la nova naturo ricevita.

Eble vi pensas ke ne, mi ne estas tia, mi ne elverŝas la vivan akvon. Tamen, mi aŭdacas diri al vi, ke se vi vivas en Kristo, kaj Kristo tion provizis al vi certe, tiam vi same certe estas tia fonto mem.

Spegulo

Vi jam aŭdis pri la mitologia rakonto pri Narciso, kiu rigardante akvon, vidis en ĝi spegule sian vizaĝon, kaj dronis.

- Kion ni vidas en la akvo? Ĉu nian propran vizaĝon? Ĉu la vizaĝon de Kristo?
- Kion respregulas el ni la akvo?
- Kio montriĝas el ni en la akvo?
- Kion montras nia sinteno al la akvo?

Ĉu nia agado kun la akvo ne respregulas nian propran naturon? nian propran memon?

Ĉu nia agado kun la akvo alportas vivon aŭ morton? amarecon aŭ refreŝigon?

Se akvo estas grava por la vivo en la universo, kia ĝi estas en nia vivo kaj en niaj rilatoj kun la aliaj homoj?

Mi dankas.



Malfrua ĉagreno

Julia Sigmond, RO

Mia Dolĉapatrino neniam havis brakhorloĝon. Mia Dolĉapatro neniam permesis al ŝi labori en iu ajn laborejo, tiel ŝi konstante estis hejme, mastrumis la domon kaj edukis siajn tri infanojn. Ŝi ne bezonis hejme brakhorloĝon kaj mi ne memoras, ke ŝi estus menciinta eĉ unufoje, ke ŝi dezirus havi ĝin.

Kiam ni abiturientiĝis, mia fratino kaj mi, ni ricevis po unu brakhorloĝon. Poste mi plurfoje aĉetis aliajn. Al neniu de nia familio venis en la kapon, ke okaze de kristnaskfestoj aŭ je ŝia naskiĝtago, ni donacu al ŝi brakhorloĝon. Ŝi eĉ ne pensis peti de ni, aŭ simple aĉeti por si mem.

Mia Dolĉapatrino estis 60 jara kiam ŝi vidviniĝis. Post la entombigo de mia



Dolĉapatro, ŝi tri monatojn ne povis ellitiĝi. Nur helpite ŝi povis iri al la banejo, kaj ŝi manĝis en la lito. Ŝi surmetis la orfigintan brakhorloĝon de mia Dolĉapatro.

Strange! Tiam, mi eĉ ne ekpensis, nur nun, post preskaŭ duonjarcento konsciiĝas en mi,

ke tiam, por mia Dolĉapatrino, tiu brakhorloĝo signifis ne nur la horloĝon de mia Dolĉapatro, sed ankaŭ la pleniĝon de ŝia subkonscia sopiro. Ŝi fine ekhavis brakhorloĝon, en ŝia 60-a jaraĝo.

Mi rompas mian kapon kaj forte pensadas, kiel eblas, ke nek mia Dolĉapatro, nek ni, la tri infanoj, neniam ni ekpensis pri la sekreta deziro de mia Dolĉapatrino. Ja estis memkompreneble por ni ĉiuj, ke ŝi ne havis pretendojn. Kiu scias, ankoraŭ pri kio ŝi rezignis, nur ke la familianoj, precipe la infanoj, ricevu pli multe!

Ĝis nun, nur pro tio mi pripentis, ke mi ne kondukis ŝin viziti la urbon Sighisoara. Treege ŝi estis deziranta vidi tiun urbon, ĉar de iu ŝi tiel aŭdis, ke ĝi estas la plej bela urbo de la lando. Ni faris planojn pri la vojaĝo, sed pro io ĝi ĉiam prokrastiĝis.

De tiam, eĉ cent foje mi travojaĝis tiun urbon, kaj el la trajnofenestro kun doloranta koro mi rigardis la urbon, kiun ŝi neniam vidis.

Kaj nun mi suferas ne nur pro la nevidita urbo de ŝi, sed ankaŭ pro la neniam donacita brakhorloĝo al ŝi.

Ĝis mi vivos, turmentos mian animon la konscienciproĉo.



La bildo montras la horloĝturon en Sighisoara.
Fotis Otto Schemmel (Wikipedia)

Morto kaj triumfo en Norda Koreo

Vilêjo GOLDSMITH, Usono

La Mizera Situacio en Norda Koreo

Dum multaj jaroj, Norda Koreo estas la plej terura diktatorado el la mondo. La plej parto de ĝia popolo ekzistas en mizero. Multaj personoj suferas malsaton kaj eĉ mortas pro malsato. Kontraste la altrangaj komunistaj oficistoj bone vivas kun sufiĉa nutraĵo kaj en bonaj domoj. Ekzistas koncentrejoj en Norda Koreo kie la malliberuloj mallonge travivas pro la torturoj kiujn ili suferas, la severa laboro kiun ili estas devigitaj fari, kaj pro la manko de nutraĵo.

La situacio estas speciale malfacila kaj danĝera por la kristanoj. Ili devas praktiki sian religion sekrete, ĉar se la aŭtoritatoj ekscias ke iu fidis je Kristo, tiu persono tuj estas portita al koncentrejo, ofte kun la tuta familio. En la koncentrejo la kristano suferas torturon kaj ekzekuton.

Multaj personoj eskapas el Norda Koreo kaj foriras al Ĉinujo. Kvankam Ĉinujo estas komunistanda lando, la situacio tie estas pli bona. Sed kiam la ĉinaj aŭtoritatoj trovas rifuĝintojn el Norda Koreo, ili tuj resendadas la rifuĝintojn al ilia lando kie koncentrejo kaj morto atendas ilin.

La Sekretaj Rifuĝejoj en Ĉinujo

Mi skribis antaŭe pri la Voĉo de la Martiroj, organizado establita de

Rikardo Wurmbrand. La “Voĉo” subtenas sekretajn rifuĝejojn en Ĉinujo ĉirkaŭ la landlimo kun Norda Koreo. Tage, la rifuĝintoj kaŝiĝas en kavernoj en la montoj meze de la neĝo. Nokte, ili iras al la rifuĝejoj kie ili ricevas nutraĵon kaj instruadon koncerne la evangelion de Jesuo Kristo.

“Andreo” laboris en iu rifuĝejo kien alvenis kvar adoleskuloj el Norda Koreo. Per la konsilo de Andreo, la kvar amikoj elektis falsajn nomojn. Ĉar ili estis viglaj junuloj, ili elektis la nomojn: “Krajono”, “Paperoviŝilo”, “Plumo”, kaj “Paperofiksilo”. Andreo instruis la evangelion al la junuloj. Tri el ili montris entuziasmon sed “Krajono” neniam atentis la instruadon. Kiam Andreo klopodis instrui, Krajono desegnis sur paperon aŭ rigardis tra la spaco. Li tute ne havis intereson. Post kelkaj monatoj de instruado, Andreo sugestis ke tri el la junuloj eble povus reiri en Nordan Koreon por porti la mesaĝon de la evangelio al sia lando. Sed Andreo opiniis ke Krajono ne estis preta por tia misio kaj li ne invitis la junulon. Tamen, la aliaj tri junuloj ne deziris foriri sen ilia amiko. Do, la kvar junuloj kune transiris la Tumen Riveron al Norda Koreo.

Kvar Amikoj Foriris, Unu Revenas

Ses monatojn post ilia reiro al sia lando,

la policianoj de Norda Koreo arestis “Paperoviŝilon”, “Plumon”, kaj “Paperofiksilon”. Kraĵono kaŝiĝis kaj rigardis la areston de siaj amikoj. La policianoj batis kaj forportis ilin en veturiloj. Kraĵono eksciis poste ke liaj amikoj estis forportitaj al koncentrejo sed li neniam vidis ilin denove.

Kraĵono pasigis du monatojn plu en Norda Koreo. Li klopodis atesti koncerne Kriston, sed li tre timis kaj ne sukcesis. Unu tagon, li rememoris la vortojn de Andreo antaŭ ol li kaj liaj amikoj ekiris: “Vi povas reveni ĉi-tien kaj mi klopodos helpi vin.” Kraĵono decidis transiri la Tumen Riveron, reiri al Ĉinujo, kaj serĉi Andreon. Li trovis Andreon kaj, kun larmoj en la okuloj, li rakontis la sorton de siaj amikoj. Andreo demandis lin: “Kion vi deziras fari kun la resto de via vivo?” Kraĵono respondis: “Mi deziras lerni esti kuraĝa kiel miaj amikoj kaj esti sentima por prediki Jesuon.”

Andreo pasigis du monatojn instruante Kraĵonon. Li observis ke la fido de la junulo kreskis kaj ke lia dediĉo al Kristo profundigis dum ili studis kaj preĝis kune. La junulo kiu ne havis intereson koncerne la evangelion, nun estas tute dediĉata al Kristo.

Aresto kaj Martireco de “Kraĵono”

Kiam Kraĵono estis preta reiri en Nordan Koreon, Andreo helpis lin renkonti kristanan geedzan paron en tiu lando. Tie, Kraĵono kaj liaj geamikoj parolis al personoj koncerne Kriston kaj ili disdonis folietojn kaj Bibliojn, speciale al almozuloj. Almozulo kun sia patrino

perfidis Kraĵonon al la polico. Li estis arestita kaj forportita al la policejo. Tie, la demandoj baldaŭ fariĝis torturo. La policianoj ofertis liberecon al Kraĵono se li malkonfesus Jesuon. Kraĵono firme rifuzis fari tion. “Mi invitis Jesuon ke Li eniru mian koron,” li respondis. “mi ne povas malkonfesi Lin.”

Kraĵono rakontis al la policianoj pri Paperoviŝilo, Paperofiksilo, kaj Plumo – ilia kuraĝo kaj sentima atesto koncerne Kristo. “Estis fojo kiam mi timegis esti kiel ili. Nuntempe, mi povas ĉar Jesuo estas kun mi.” Hontitaj pro la manko de timo de la junulo, la policianoj ege batis lin. “Ni estas grandaj pekuloj ĉi-tie en Norda Koreo ĉar ni ne kredas je Dio,” Kraĵono diris al ili. “Eĉ se vi mortigas min, iun tagon vi fariĝos kristanoj.” La policianoj tre koleris kaj ili elprenis la fingrongojn po unu de la junulo.

Ege batita, sanganta, kaj preskaŭ morta, Kraĵono estis forportita al labor-koncentrejo. La komunistaj aŭtoritatoj malpermesis ke Kraĵono ricevu nutraĵon, sed li devis labori kaj produkti egale kiel la aliaj malliberuloj. Ĉiutage, Kraĵono diris al la aliaj malliberuloj kaj eĉ la gardistoj: “Jesuo estas la kialo por ke mi povas daŭri.” Pro lia atesto kaj firmeco, multaj personoj en la koncentrejo ricevis Kriston kiel sia Savanto. Post du monatoj en la koncentrejo, Kraĵono mortis. Li neniam havis sian 20-an naskiĝtagon.

Triumfo Post Martireco

Ne longe post la morto de Kraĵono, la kristana geedza paro estis arestita kaj

sendita al la sama koncentrejo. Ili tre surpriziĝis trovante tie kredantojn kiuj rakontis al ili pri la morto de Kraĵono. La geedza paro estis en la koncentrejo nur mallongan tempon kiam la komandanto, “Rhee”, ordonis ke ili estu liberigitaj. Ili estis hejme nur de kelkaj tagoj kiam ili aŭdis iun kiu frapis al la pordo. Estis la komandanto, Rhee, kiu volis paroli kun ili. “Mi estis torturintaj kaj mortigintaj multajn personojn,” li diris. “sed post la morto de tiu junulo, mi tre ĉagreniĝis.” Rhee rakontis al ili pri la kuraĝo de ilia amiko, kaj lia ĝoja spirito eĉ kiam lia korpo estis mortanta.

La geedza paro klarigis al Rhee kial Kraĵono estis kuraĝa kaj ĝoja. Ili diris ke Rhee devas surgenuiĝi por inviti Jesuon por ke Li eniru lian koron. Kiam ili finis preĝi kune, Rhee invitis siajn novajn kristanajn fratojn ke ili iru hejmen kun li. Interne en la granda hejmo de Rhee, estis ok anoj el lia

familio, kaj kelkaj aliaj gardistoj el la koncentrejo kune kun siaj familianoj. Ili zorge aŭskultis dum la juna geedza paro parolis pri la amo de Jesuo, Lia morto sur la kruco, Lia releviĝo, kaj la plano de savo. Kelkaj aŭskultantoj silente ploris.

Rhee tre surpriziĝis kiam lia propra patrino stariĝis kaj konfesis ke dum 50 jaroj ŝi estis sekreta kristano. “Mi jam ne hontas pri mia fido,” ŝi diris. Tiam, ŝi demandis la aliajn personojn en la ĉambro: “Kiu volas akcepti Jesuon en sian koron?” Ĉiuj ĉeestantoj levis la manon. Ĉiuj ili estis baptitaj en tiu nokto.

La kvar junaj martiroj ne vane mortis. Tiel “la vorto de Dio kreskas kaj pligrandiĝas.” (La Agoj 12:24) Haleluja!



El *Preĝo por ĉiu Tago* de Jelly Koopmans-Schotanus

9. Marto (la tago de la martiroj)

Ho Sinjoro mia Dio, faru el ni branĉetojn de la vera vinberujo. Ni portu multajn fruktojn kaj per tiuj ni honoru Vin.

Maltrankvilaj kaj malĝojaj homoj ĉerpu konsolon kaj kuraĝon el niaj vivoj.

Tiun-ĉi libreton Vi povas mendi ĉe sekretario Pavel Polnický (adreso sur paĝo 2). Per la aĉeto Vi subtenas la agadon de Stichting Zienderogen, kiun iniciatis Jacques Tuinder.



Enkonduko historia – iom pri alilingva verkado

el la enkondukaj ĉapitroj por ANTOLOGIO LATINA 5

Gerrit BERVELING, NL

Greka

Precipe la frua kristanismo liveris amason da greklingvaj aŭtoroj.

Frua grupo estis poste kolektita sub la indiko Apologetoj: ekzemple Kvadrato, kiu tempe de vizito de Hadriano al Ateno (ĉ 124/6) verkis apologion pri la nova religio. Restas nur fragmento.

En la pasinta volumo ni jam menciis pri la unuaj Aleksandriaj Patroj (kateĥezista edukejo ekde **Klemento**, Κλήμης Ἀλεξανδρεὺς, Clemens Alexandrinus, ĉ 150-ĉ 215), kiu i.a. instruis, ke ĉiu puno venanta de Dio ĉiam celas sanigi aŭ eduki; sekve lia posteulo **Origeno** (Origénes, Ὠριγένης ĉ 185-235) instruis, ke eĉ la infero ne povas do esti eterna: finfine ĉio kaj ĉiu konvertiĝos pentoplene al Dio, ankaŭ la demonoj; same instruis postaj Grekaj teologoj, **Gregorio de Niso** (Γρηγόριος Νύσσης, ĉ 335-post 394), lia frato **Bazilio** (Βασίλειος ὁ Μέγας), ĉ 330-379) kaj ilia amiko **Gregorio de Nazianzo** (Γρηγόριος ὁ Ναζιανζηνός, 329-389). La Latinaj teologoj tamen fundamente kontraŭis tion: laŭ ili ĉiuj kristanoj saviĝos, sed ja tra la fajron de la juĝo, eĉ Jesuo, la apostoloj kaj ĉiuj sanktuloj.

La Aleksandriaj Patroj verkis enkondukojn en novan religion, prizorgis (ĉefe Origeno) fidindan eldonon de la Septuaginto-traduko de la Biblio. La

Aleksandria biblio estis tuj apude – mondfama studejo kaj instruejo. Kaj ili verkis amason da komentoj pri bibliaj libroj. La tuta verkaro de Origeno estis neimageble ampleksa: Epifanio eĉ asertis, ke temas pri pli ol 6000 titoloj!

Aktivis en Romo la Greklingva aŭtoro **Hipolito** (Ἰππόλυτος, ĉ 170-235). Li ekkverelis kun papo Kalisto, kiam tiu difinis punon liaopinie tro etan por adultado. Liaj sekvantoj elektis lin episkopo en 217 – per tiu skismo li fariĝis la unua kontraŭ-papo.

Li verkis preskaŭ same multe kiel Origeno, sed multege malpli originale. Restas de liaj verkoj amaso da fragmentoj en tradukoj Latina, Siria, Kopta, Araba, Etiopia, Armena, Kartvela kaj fru-Slava. Jam tio montras, ke tiuepoke multe da lingvoj estis uzataj skribe, kvankam restas relative malmulte. En 1551 sur tombo-monumento lia apud Via Tiburtina (Romo) oni trovis difektitan listigon de verkoj liaj. En 1842 oni retrovis la plimulton de lia Refutado de ĉiuj herezaĵoj. Li provas en ĝi pruvi, ke herezaĵoj kutime deprenas siajn ideajn fontojn el Greka filozofio. Entute 33 Gnostikajn sistemojn li traktas.

Kune kun papo Pontiano de Romo ankaŭ li mortis martire en 235; Hipolito estas la sola kontraŭ-papo, kiu estas honorata kiel sanktulo.

Ne nur Hipolito, sed la plimulto de

1^o eklezio de Romo restis Greklingva dum pluraj jarcentoj. Tamen, Cipriano korespondis kun ĝi Latine.

Eusebio (Εὐσέβιος ὁ Καισαρείας, ĉ 263-339) fariĝis la unua grava historiisto de Kristanismo: lia Eklezia Historio en dek libroj ankoraŭ estas unu el la gravaj fontoj, pri kiuj ni disponas. Li devenis el Palestino, fariĝis episkopo de Cesareo, kaj dum certa tempo estis konsilisto de Konstantino, kiu aranĝis la unuan gravan Koncilion. Pri la imperiestro li ankaŭ verkis Vivo de Konstantino. Krome li verkis plurajn malpli gravajn aferojn.

Por dogma historio gravas **Atanasio** (Αθανάσιος, 295-373), patriarĥo de Aleksandrio, kiu batalis kontraŭ la Arianoj.

Ankaŭ ne-kristana literaturo ankoraŭ estis verkita Greke.

Diogeno Laertio (Διογένης Λαέρτιος, ĉ 220) verkis famajn biografiojn pri Grekaj filozofoj en dek libroj. Lia verko restas mirinde riĉa fonto por nia scio pri multe da fruaj pensuloj.

Lukio Kasio Diono (Lucius Cassius Dio, ĉ 150-235) estis Romana senatano, kiu estas kvazaŭ la ekzemplo de la komplete Grekigita Romano. Li estas la lasta, kiu antikvepoke verkis Greke historion pri la Romia Imperio. Krom tio li verkis ankaŭ aliajn historiajn studaĵojn. Li verkis kiel eble plej sentaŭjuĝe. De lia historio pri Romo – de la urbofondo ĝis imperiestro Aleksandro Severo – restas el la origine 80 libroj nur libroj 36-60 pri la jaroj 68 a.Kr.-47 p.Kr. Krome ni posedas plurajn resumojn de aliaj libroj.

Li naskiĝis en Niceo en Bitinio (nuna



Eusebio

Turkujo), venis en 180 al Romo, kie li membriĝis en la senato, laboris kiel advokato dum imperiestro Komodo, poste oficis kiel guberniestro en Pergamo kaj en Smirno; konsulo en 220; prokonsulo de Afriko; guberniestro en Dalmatio, poste en Panonio; ree konsulo en 229. Li mortis en Niceo.

Klaŭdio Eliano (Claudius Aelianus, ĉ 175-235), Greklingva aŭtoro, naskita en la Latina urbo Prenesto (nuna Palestrina apud Romo), instruisto pri retoriko. Li tiel perfekte parolis Greke, ke li ricevis kromnome la indikon mielbuŝa. Li verkis en iom arĥaika stilo.

Restas de li Naturo de la bestoj, en kiu li ofte senkritike rakontas anekdotojn pri bestoj. Ofte li dependas de Plinio la Pliaga. Mezepoke oni ofte citis lin nacilingve.


Lia Variaj Historioj estas amaso da anekdotoj pri plej diversaj temoj, entute 14 libroj: pri mitoj, filozofoj, poetoj, historiistoj, teatro-ludantoj ktp.

Filostrato (Flavius Philostratus, 170-245 p.Kr.), laŭ peto de Julia Domna,

faris el la rakontoj pri Apolonio de Tiano prezentindan version por larĝa publiko: rezultis la konata oklibra verko Vivo de Apolonio de Tiano. Alia verko lia: Vivo de la Sofistoj.

Longo (devas esti origina Latina nomo, Longus) verkis ĉarman romanon pri la vekiĝanta sekseco de juna paro: Lesbiaka aŭ Dafniso kaj Ĥloa. Nuntempe oni kutime datumas ĝin ĉ 250 p.Kr. Goethe estis ege entuziasma pri ĝi. En la 6-a ĝis 8-a jc oni absolute ne plu interesiĝis pri ĉi tiu ĝenro. Nur filologoj el la 9-a jc en la Bizanca regno denove eklegis ĝin. En Okcidento oni ekkonis la verkon pere de Latinaj tradukoj en la Renesanco. La paŝtista poezio de la Renesanco estis influita de Vergilio – Bukoliko, sed ankaŭ de Teokrito, kaj kompreneble ankaŭ de Longo...

El pli malpli sama epoko datiĝas la Orfeaj Himnoj (ĉ 250), kolektaĵo de 88 himnoj laŭdire verkitaj de **Orfeo** ĝis **Musajo** (Mousaios). Ili ludas rolon en la t.n. Hermetismo, mistika movado, kiu ankaŭ en Renesanco poste ree havis



Plotino

multan influon.

Grava filozofo estas **Plotino** (Πλωτῖνος, ĉ 205-270), kiu deiris de Platonismo – precipe de liaj Politeia kaj Symposion – kaj krome li grave estis influita de religio. Egipto denaske, li mortis en Romo. Liaj filozofiaj eseoj aperis en Eneadoj (9-opoj). Novplatonismo havis grandan influon sur kristanaj teologoj, kiel Basilio, sed precipe ĉe Aŭgustino. Dank’ al Makrobio kaj Aŭgustino, ankaŭ en Mezepoko Plotino restis konata. Poste Marsilio Ficino (1433-1499) faris tradukojn el la Greka Latinen, – kaj ekzemple Leibniz, Novalis, Goethe kaj Schelling ankoraŭ ricevis lian influon.

Famiĝis aventurplena am-romano de **Heliodoro de Emeso** (Ἡλιόδωρος, 3-a aŭ 4-a jc). La verko estas 10-libra: Aithiopika. Longtempe post la klasika periodo la verko ne estis plu konata. Sed dum Renesanco, dum priirabado de Buda (okcidenta parto de Budapeŝto), ĝi estis trovita en 1526, en la biblioteko de la Hungara reĝo Matiaso Korvino, kiu ankaŭ reĝis pri Kroatio (Matthias Corvinus, 1443-1490). Siatempe lia biblioteko estis – krom la Vatikana – la plej granda de Eŭropo, kun pluraj miloj da manuskriptoj. La unua presita eldono de la Etiopia Aventuro aŭ Theageno kaj Ĥariklea aperis en Bazelo en 1534. La unua traduko – France – aperis en 1547.

Libanio (Λιβάνιος, ĉ 314-394) devenis el Antioĥio, instruisto pri retoriko. Restas de li multaj oratorajoj kaj ĉ 1545 leteroj – multe pli ol de Cicerono!



LA BONA MESAĜO DE JESUO – la kvar evangelioj

Recenzo de la traduko de Gerrit Berveling

Bengt Olof ÅRADSSON, SE

LA BONA MESAĜO DE JESUO – La kvar evangelioj. La Nova Testamento vol. 2
(Ĝustigita versio de antaŭaj tradukoj)
Tradukis kaj redaktis: Gerrit Berveling
Eldono: Fonto 2012

Kiom da Biblioŝoj vi havas hejme? Certe plurajn. Nun mi proponas al vi ankoraŭ unu. Ne la tutan Biblion tamen, sed la librojn el la Nova Testamento (NT) kiujn tradukis Gerrit Berveling. Mi parte tralegis la kvar evangeliojn, kune binditaj en la volumo nomita LA BONA MESAĜO DE JESUO.

Eble vi jam rimarkis ke mi uzis lian tradukon kiam mi en artikoloj kelkfoje citis el la Nova Testamento. Tiamaniere mi volis doni al vi la eblecon kompari la tekston kun la kutima traduko kiun vi jam havas hejme.

En mia nacia lingvo, la sveda, mi spertis plurajn tradukojn dum la jaroj kaj kun miksitaj sentoj mi alkiutimiĝis al la novaj tekstenhavoĵoj. Kiam en Svedio nova oficiala traduko de Nova Testamento aperis en 1981, ni aranĝis studgrupojn en nia eklezio por pridiskuti la tradukon. Kompreneble ni ne facile akceptis ĉiujn ŝanĝojn. Troviĝis multaj miskomprenoj kaj antaŭjuĝoj pri la tekstoj, la originalaj lingvoj/tekstoj kaj ankaŭ pri la taŭgeco de la tradukistoj.

Inter krampoj – mi memoras ke mi iam en sveda KELI-rondo ricevis la

demandon sur kiu traduko la esperanta Biblio baziĝas, ĉu la nova aŭ la malnova (sveda) traduko.

Do, kial mi ŝatas novan aŭ pli precize kroman tradukon. Ĉar mi ne scipovas la lingvojn en kiuj la originalaj tekstoj estis verkitaj, mi opinias ke estas bone vidi diversajn tradukojn kaj esprimojn, ĉar tio donas pli vastan komprenon de la teksto. Ne nur la vortoj estas tradukitaj sed ankaŭ iom de tiutempa kulturo kaj la kompreno de la nuntempa tradukisto enmiksiĝas en la tradukita teksto. Tio ankaŭ signifas ke tekstoj rilatas al tiu tempo kiam oni tradukis ilin.

Neniu traduko estas perfekta – simple ne eblas. Samtempe ni estu certaj ke neniu konscie tordis aŭ misprezentis la mesaĝon dum la traduklaboro. Gerrit Berveling mem konstatas en la enkonduko: *“traduki oni povas laŭ plej diversaj metodoj. Mi persone preferas traduki verkon tiel, ke kiam eble mi retenu la internan koheron de la koncerna verko.”*

Kun ĝojo mi posedas la volumon LA BONA MESAĜO DE JESUO. Ĝi ne nur estas nova traduko de Nova Testamento, sed ĝi ankaŭ enhavas multajn kromajn

informojn kaj rimarkojn por ke la leganto povu orientiĝi en kaj pri la tekstoj. La teksto ankaŭ havas piednotojn kun indikoj al tekstolokoj en la Malnova Testamento aŭ klarigoj al la traduko.

Kelkaj rimarkoj pri la libro:

- La libro komenciĝas per 5-paĝa ĝenerala enkonduko.
- La evangelioj krome havas enkondukon de kelkaj paĝoj kaj ankaŭ kelkajn paĝojn de finaj notoj por helpi la komprenon.
- Fermas la volumon *Sinopso* pri la evangelioj de pli ol 10 paĝoj.
- Gerrit Berveling sekvas por mallongigoj de la nomoj de Bibliaj libroj la ekzemplon de TERMINARO POR BIBLIAJ STUDIOJ de G. Rust kaj D Broadribb. Pro iu kaŭzo ADORU havas alian sistemon, kiun mi plej

- ofte uzas en Dia Regno – kaj preferas.
- Ĝenas min la ne-sistema uzado de minuskloj/majuskloj komence de kelkaj vortoj. Ekz. kial skribi kun majuskloj *Olda Testamento* kiam per miksaĵo *Rom-Katolika biblio*? Alia ekz. *Enkonduko ĝenerala* kiel rubriko sed *Enkonduko Ĝenerala* en la indekso. Mi lernis ke adjektivojn mi skribu per minuskloj, sed ofte mi renkontas en la libro miksaĵojn: ekz. *Greka, Greklingva, Helena* sed *helenisma; Bibliaj libroj* sed *bibiaj evangelioj*
- La skizaj prezentoj de la evangeliaj enhavoj multe plaĉas al mi.
- Krome la libron plibeligas ilustraĵoj de Gustav Doré.

Sube vi povas kompari kelkajn teksterojn.

Laŭ Marko 1:15

la tempo jam plenumiĝis, kaj la regno de Dio alproksimiĝis

Pleniĝis la tempo – kaj la Regno de Dio proksimas

Laŭ Johano 1:1-4

En la komenco estis la Vorto, kaj la Vorto estis kun Dio, kaj la Vorto estis Dio. Tiu estis en la komenco kun Dio. Ĉio estiĝis per li; kaj aparte de li estiĝis nenio, kio estiĝis. En li estis la vivo, kaj la vivo estis la lumo de la homoj. Kaj la lumo brilas en la mallumo, kaj la mallumo ĝin ne venkis

En la komenco estis la parolo, kaj la parolo estis ĉe Dio, kaj Dio estis la parolo. Tio estis en la komenco ĉe Dio. Ĉio estiĝis pere de ĝi, kaj sen ĝi nenio estiĝis. Kio estiĝis, vivis en ĝi kaj la vivo estis la lumo de la homoj. Kaj la lumo brilas en la obskuro kaj la obskuro ne kaptis ĝin.

Laŭ Luko 2:8-9

Kaj en tiu sama regiono estis paŝtistoj, kiuj kamploĝis kaj nokte gardis sian gregon. 9Kaj anĝelo de la Eternulo alstaris apud ili, kaj la gloro de la Eternulo brilis ĉirkaŭ ili, kaj ili timis per granda timo.

En la najbaraĵo estis paŝtistoj kiuj subĉiele tranoktis kaj prigardis nokte sian ŝafaron. Anĝelo de la Sinjoro stariĝis ĉe ili kaj gloro de l'Sinjoro ilin ĉirkaŭlumis. Ili ege timiĝis.

Raporto de la jarkunveno

Svitavy 08.08.2013

Ĉeestis la estraranoj: Philippe Cousson, prezidanto; Ágnes Ráczkevy-Eötvös, kasisto; Pavel Polnický, sekretario; Bengt Olof Åradsson, redaktoro; Václav Pospíšil, membro. Mankis la membroj Samuel Gaillard, Zoltán Somhegyi.

Ĉeestis 23 membroj kaj 2 gastoj.

- 1 La prezidanto malfermis la kunvenon kaj ni kantis el Adoru 390:1,2,7,8,9.
- 2 Els van Dijk kaj Vera Tuinder estis elektitaj kiel kunprotokolantoj.
- 3a La membroj akceptis la tagordon.
- 3b Pro frua foriro de Stefan Lepping, estrarano de IKUE por ekumenaj aferoj, la kunveno traktis komunan kongreson en 2014, sub punkto 3. Sinjoro Daminelli, la prezidanto, sendis leteron pri tiu temo. Propono: komuna kongreso en Trento (Italio), eble 17-24 aŭguston en centro por mond vasta transreligia laboro, Mariapoli. Ĝi estas bone atingebla kaj en la regiono loĝas helpemaj esperantistoj. Kondiĉo de KELI: ekvilibro de kostoj kaj akceptebla kotizo. Aliĝilo eble pretiĝos fine de septembro. En 2015 okazos la Universala Kongreso en Lille, Francio. Philippe proponis organizi ekumenan kongreson en Strasburgo. La membroj konsentas kun punkto 3b.
- 4 Komunikoj. Salutoj de s-ro Daminelli, Wil van Ganswijk, Irén Bagi, Albrecht Kronenberger, Anna kaj Mats Landfors, Gerda Dercks, Grete Burkhardt, Milan Kazdera.
- 5 Funebra memorigo. Forpasis: Donald Broadribb, Berend van Opheikens, Nel van Iperen-de Vries, Anna- Liisa Heikkinen.
- 6 Sekretaria jarraporto ne aperis ĉar okazis nenio grava. Pavel sendis 20 admonojn al ne-pagantaj membroj kaj reagis nur du. La aliaj ne plu ricevos Dia Regno-n kiu estas sendata al 35 landoj. Ne eblis inviti afrikanojn al KELI-kongreso pro altaj garantiaj kostoj kaj vizaj problemoj. Karl-Heinz Schaeffer raportis pri la Universala Kongreso en Islando. Philippe repre-

zento KELI-on dum la eklezia tago fine de septembro en Parizo. Novaj kontaktoj en Hindio kaj Kubo.

- 7 Kasista raporto. Ni deponis la kapitalon ĉe Universala Esperanto-Asocio kaj la CIC-banko en Francio. La elspezoj estis malpli ol buĝetitaj. Gajno 1.623,13 eŭroj. Membroj donacis pli da mono al la Adopta Kaso ol antaŭvidite. La valoro de la librostoko estu ŝanĝota.
- 8 La kaskontrolo okazis en tiu ĉi kongreso. La kontrolantoj Karl-Heinz Schaeffer, Markus Holzäpfel, Siegfried Krüger, senŝarĝis la kasistinojn.
- 9 Unuanima akcepto de la financa raporto kaj la informoj de la sekretario, substrekitaj per aplaŭdo.
- 10 Buĝetoj. La kostoj de la presado de Dia Regno malgrandiĝis pro reduktado de la kvanto. El nia biblia provizo stokita ĉe Karl-Heinz, li vendis 44 ekzemplerojn en valoro 547,60 Euro.
- 11 La redaktoro ricevis malofte reagojn. La lingvo de nia revuo estis bone komprenebla kaj la revuo regule aperis, Éva kaj Pavel kontrolis. Bengt-Olof ĉerpis foje artikolojn el arĥivo ĉar mankis al li tekstoj. Li petis sendi materialon kaj eble mencii la kongreson en loka eklezia gazeto. La retejo ne allogis novajn membrojn.
- 12 La membroj reelektis Philippe Cousson (unuanime) kaj Samuel Gaillard (5 detenis).
- 13 Vidu punkton 3.
- 14 Proponoj kaj sugestoj de la membroj. Sendi dankleteron al s-ro Daminelli por liaj provoj trovi kongresejon 2014.
- 15 Fermo.

Kelkaj el la estraro dum la jarkunveno



informe _ _ _ _ _

Ni laŭtlegis la Bibliion en Esperanto!

Jam plurfoje ni publikigis en Dia Regno iom da informo pri la projekto laŭtlegi la Bibliajn librojn. La projekton iniciatis Ken Caviness. Ĉiuj libroj de la Biblio jam troviĝas aŭdeblaj ĉe la retpaĝaro:

<http://hw.cs.southern.edu/eb/>

Tie vi povas alklaki tiun biblian libron, kiun vi volas aŭskulti. La teksto kaj la voĉo troviĝas samloke, do eblas kaj legi kaj aŭskulti la tekston samtempe. Admirinda laboro!

/Bengt Olof Åradsson



La unuan historion mi faris, ho Teofilo, pri ĉio, kio ankaŭ post sia suferado li montris sin vivanta per la atendi tiun promeson de la Patro, pri kiu (li diris) '




Ĝi do, kunveninte, demandis lin, dirante: Sinjoro Sed vi ricevos povon, kiam la Sankta Spirito verŝiĝis, ankorau dum ili rigardis, kaj nubo riris Galileanoj, kial vi staras rigardantaj al la ĉielo? Ĉi



12 Tiam ili iris returne al Jerusalemo de la monteto Petro kaj Johano kaj Jakobo kaj Andreo, Filipo kaj petado, kun la virinoj, kaj Maria, la patrino de Jesu



BIBLIAJ TAGOJ 2014



Laŭinforme la Bibliaj tagoj okazos de la 30a de aprilo ĝis 4a de majo 2014 en Tuchoměřice Prago, Ĉeĥujo.

Informas:

Stefan Lepping: stefanlepping@gmx.de



NEKROLOGO

Cornelis Leen Dekker RA

Teksto sur la funebra anonco: *‘Ĉar vi estas la beleco de ilia forto’*.
Psalmo 89:18. Kees naskiĝis en Rotterdam, la 3-an de aŭgusto 1920 kaj forpasis en Zeist, la 4-an de oktobro 2013. Li studis Esperanton kun sia edzino Coosje kiu mortis en 2004. Mi renkontis ambaŭ en kunvenoj de la nederlanda sekcio de KELI. Estante membro de Esperanto Nederland, li ĉeestis plurfoje ankaŭ interparolajn kunvenojn en restoracio de De Bilt. Profesie li laboris kiel kontrevizoro kaj ricevis la reĝan distingon, kiu nomiĝas Oficiro en la Ordeno de Oranje Nassau.



La funebra diservo kaj entombigo okazis la 10-an de oktobro en Driebergen.

Mi rememoras lian afablecon kaj kunsenton.
Ni sincere kondolencas la parencojn

Els van Dijk

Tag' de l' Sinjor'

JOUR DU SEIGNEUR



1. Tag' de l' Sin - jor'! En ni - a kor' re -
2. Nin Di - a vort' en ĉi - a sort' kon -
3. Do kan - tu ni, la e - kle - zi', la



bri - lu lu - mo vi - a. Ho tag' de l' ben'! Kun
du - kas laŭ la ve - ro. La pan' de l' sav', la
kor - po de l' Sin - jo - ro, en har - mo - ni' al



ĝo - jo - plen' a - do - ro so - nu pi - a.
vin' de l' rav' for - ti - gas nin sur te - ro.
Vi, ho Di', al Vi - a laŭd' kaj glo - ro.

JOUR DU SEIGNEUR • Alléluja 21-5 • M: Christoph Peter 1655, laŭ Leipzig 1625: *Ach Gott und Herr* • franca T: laŭ Matthias Engel (1753-1815)
• E (strofoj 2 kaj 3 originale verkitaj): Albrecht Kronenberger 2013-08-05, dediĉe al la ĵus okazinta KELI-Kongreso en Svitavy, Ĉeĥio